SK-9/1
B-2 M

# LA VOJO

Poemo de

D-ro L.-L. ZAMENHOF

Muziko de

RENÉ DESHAYS

Harmonigiita kaj ĥore aranĝita de

F. DE MÉNIL

ESPERANTISTA GRUPO SEVILLA

PARIS
PRESA ESPERANTISTA SOCIETO
33, RUE LACÉPÈDE, 33

—

1905

+122

ESPERANTISTA GRUPO SEVILLA


Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio
Rodriguez San Pedro 13 - 3º - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (9)1 - 4468079


# LA VOJO

Poemo de
D-ro L.-L. ZAMENHOF

Muziko de
RENÉ DESHAYS

Harmoniĝita kaj ĥore arangita de
F. DE MÉNIL




Tom pli rapide.
nok_ta ĉi_e _ lo Al ni la direkton ĝi di_ras Kaj nin ne ti_mi_gas
nok_ta ĉi_e _ lo Al ni la direk_ton ĝi di_ras. Kaj nin ne ti_mi_gas
nok_ta ĉi_e _ lo Al ni la direk_ton ĝi di_ras. Kaj nin ne ti_mi_gas
nok_ta ĉi_e _ lo Al ni la direk_ton ĝi di_ras. Kaj nin ne ti_mi_gas
la nok _ taj fantomoj. Nek batoj de l'sor _ to nek mokoj de l'ho _ moj, Ĉar
la nok _ taj fantomoj. Nek batoj de l'sor _ to, nek mokoj de l'ho _ moj, Ĉar
la nok _ taj fantomoj. Nek batoj de l'sor _ to, nek mokoj de l'ho _ moj, Ĉar
la nok _ taj fantomoj. Nek batoj de l'sor _ to, nek mokoj de l'ho _ moj, Ĉar
1° Movo
Malrapidigante
Crescendo
kla_ra kaj rek_ta kaj tre di_fi_ni_ta Ĝi es_tas,la Voj' e_lek _ti _ ta
kla_ra kaj rek_ta kaj tre di_fi_ni_ta Ĝi es_tas,la Voj' e_lek _ti _ ta.
kla_ra kaj rek_ta kaj tre di_fi_ni_ta Ĝi es_tas,la Voj' e_lek _ti _ ta.
kla_ra kaj rek_ta kaj tre di_fi_ni_ta Ĝi es_tas,la Voj' e_lek _ti _ ta.

2277

Federación E... Esp...
Hispana Esp... ede
Rodriguez S... P...
Tel. +34 - (91) - 4468079

# LA VOJO

Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l'sorto, nek mokoj de l'homoj,
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgaja konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
*L'espero, l'obstino* kaj la *pacienco* —
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l'tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, —
Ni semas kaj semas konstante.
« Ho, ĉesu! » mokante la homoj admonas, —
« Ne ĉesu, ne ĉesu! » en kor' al ni sonas:
« Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
Se vi pacience eltenos ».

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantajn foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton, kaj, repurigitaj,
Ni forton pli freŝan akiras.
Ne mortos jam nia bravega anaro,
Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro,
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
Al cel' unu fojon signita!

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L'espero, l'obstino kaj la pacienco, —
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

---

ptx1970hf002277mf